# *Tago de la kuba sciento: per scienco kaj volo*

*Image not found or type unknown*




**Foto:Granma**

Havano,  jan 16 (RHK) La koncernaj atingoj de la kuba scienco estas la fiero de la Patrujo kaj la rezulto de la vizio de Fidel kaj la laboro de la Revolucio, asertis la kuba prezidento Miguel Díaz-Canel.

?i tiun 15-an de januaro, Kuba Scienca Tago, la Unua Sekretario de la Centra Komitato de la Partio gratulis la sciencistojn de la lando, "kiuj pruvas ?iutage, ke ?i eblas", kaj aldonis ke, "kun talento, disciplino kaj persistemo ni povas disvolvi?i, kaj vi estas nia plej bona inspiro."

La nacia aran?o okazis en Sancti Spíritus, kun la ?eesto de Jorge Luis Broche Lorenzo, membro de la Sekretariejo de la Centra Komitato kaj estro de la Departemento de Atento al la Socia Sektoro; Inés María Chapman Waugh, vic?efministro; same kiel reprezentantoj de la scienca komunumo.

En sia parolado, la ministrino pri Scienco, Teknologio kaj Medio, Elba Rosa Pérez, atentigis, ke “hodia? estas pliforti?o de la scienc-politika rilato, efektivigo de registara administradsistemo bazita sur scienco kaj novigo. Nun ni devas enkorpigi ?i tiun labormetodon en ?iuj sektoroj”.

En la ceremonio, okazigita en la ?efteatro de Sancti Spiritus, estis agnoskitaj sciencistoj kaj naciaj kaj lokaj entoj kun efiko al evoluo, kiel la CIGB de Sancti Spíritus.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/310644-tago-de-la-kuba-sciento-per-scienco-kaj-volo

**Radio Habana Cuba**